Ili do sidiĝis, kaj dum kelkaj minutoj *neniu* parolis. Alicio pensis interne, "Kiamaniere li povos fini, se neniam li komencos, *tion* mi ne povas kompreni." Tamen ŝi pacience atendis.

"Iam en la pasinto" diris fine la Falsa Kelonio kun profunda ekĝemo "mi estis *vera* Kelonio."

Sekvis tiujn vortojn tre longa silento, kiun interrompis nur la okazaj interjekcioj (*Hjckrrh, Hjckrrh*) de la Grifo kaj la konstanta plorĝemado de la Falsa Kelonio. Alicio preskaŭ decidiĝis levi sin kaj peti forpermeson, dirante. 'Mi tre dankas vin, sinjoro, por via interesa rakonto.' Tamen, ĉar ŝi supozis, ke li nepre diros iom pli, ŝi restis trankvile, kaj nenion diris.

"Kiam mi estis malgrandulo" fine la Falsa Kelonio daŭrigis iom pli trankvile (kvankam eĉ nun li plorĝemis ne malofte) "la gepatroj sendis min al lernejo en la maro. La instruisto estis iu maljuna kelonio—ni kutime nomis lin Testud'—— "

"Pro kio vi nomis lin Testud" ĉar li ne estis Testudo?" interrompis Alicio.

"Ni ja nomis lin Testud', ĉar li estis fame konata *te-studento*, kaj tre ŝatis paroli pri la te-kulturo. Ĉu vi ne povis konkludi tion, ne demandinte?"

La Falsa Kelonio evidente indignis, ke pro ŝia malspriteco li devis doni tiun klarigon.



Kaj la Grifo aldonis: "Vi devas honti, demandinte pri tia simpla afero."

Tiam, por doni pli fortan emfazon al la riproĉo, ambaŭ sidis silente kaj rigardegis Alicion, ĝis pro konfuzo ŝi estus tre kontenta ke la tero malfermiĝu kaj kovru ŝin. Fine, la Grifo diris al la Falsa Kelonio:

"Vi rapidu, malrapidulo! oni ne povas tie ĉi atendi la tutan tagon."

La Falsa Kelonio daŭrigis per jenaj vortoj:—

"Jes, ni iris al la lernejo en la maro, kvankam vi eble ne kredas tion—— "

"Mi ne diris ke mi ne kredas" interrompis Alicio.

"Vi ja ofte diris tion" diris la Falsa Kelonio "almenaŭ se vi similas aliajn hominfanojn."

Kaj antaŭ ol Alicio povis ree ekparoli, la Grifo ekkriis al ŝi severe: "Vi fermu la buŝon!"

La Falsa Kelonio daŭrigis: "Tre bonan instruadon ni havis; fakte, ni iris lernejon ĉiutage—— "

"Pri tio vi ne devas fanfaroni" diris Alicio "ankaŭ mi iras en ĉiutagan lernejon."

"Ĉu vi lernas *ekstraĵojn*?" demandis la Falsa Kelonio.

"Jes" respondis Alicio "la francan lingvon kaj la muzikon."

"Ankaŭ la vestlavadon?" demandis plue la Falsa Kelonio.



LEWIS CARROLL *La Aventuroj de Alicio en Mirlando* Esperanto translation (Illustrated by Brinsley Le Fanu) LONDON, 1910 THE BURSTEIN COLLECTION Octavo